

Max von Schenkendorf,
Ho liber', adore

tradukita de Manfredo Ratislavo

1. Ho liber', adore
Mi ja amas vin,
Mi deziras kore:
Venu je la fin'!
Ĉu vi venos iam
Al ni, la homar'?
Ĉu vi restos ĉiam
Inter la stelar'?

2. Ankaŭ en arbaro,
Kie migras mi,
Kaj sub rev-floraro
Ja troveblas vi.
Estas vivo vera,
Kiam regas vi
Sur la rondo Tera,
Tiam ĝojas ni.

3. Kiam alrigardas
Ni amike nin,
Kiam kisoj ardas,
Amas nin knabin'...
Sed ne haltas iam
Tiu kor-dezir',
Al ĉielo ĉiam
Strebas la sopir'.

4. Venas kanto mia
El trankvila land',
Bilda idilia
Estas mia kant'.
Floras flor' ĝardena,
Estas multe da
Spikoj eĉ en jena
Ŝtona mondo ja.

...

5. Kie Dia flamo
Brulas en la kor',
Kun fidel' kaj amo
Al la propra mor';
Kie sin defie
Ligas por justec'
Kuraĝuloj, tie
Regas liberec'.

6. Inter urbaj muroj
Povas ŝveli kor'
Por preĝejoj turoj,
Por prapatra mor',
Strebas supren tiam
Lumen al altec',
Pretas morti, kiam
Vokas liberec'.

7. Ho, efektivigu
Dia la favor',
Plene profundiĝu
En la homa kor'.
Ho liber', aminda,
Kara estas vi,
Ege dezirinda,
Venu vi al ni!

*Traduko de la Germana poemo "Freiheit, die ich meine" de MAX VON SCHENKENDORF (*1783 – †1817) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-01-29.*

MR-445-1 / Arg-340-682 (2006-02-01 16:00:35)

La kanto estas kantata laŭ la melodio de Karl Groos (1789 - 1861).